

# Ĉineske

(XV)

e-Librigita de Eterno  
decembro 2011

# Busuanzi (Aŭguristo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de  
55,75 silaboj kun duona rimo.

## Cezar (Germanujo)

### Dika Kaj Tamen Grava

(por Beth Ditto)

**Ŝia dikeco**

**plu zorgas por bru'.**

**Sed ŝi kantas bonege**

**punkbande kun ĝu'.**

**Amas ŝi inon,**

**sed ne por skandal'.**

**Ŝi diras ĝin publike**

**en tv-kanal'.**

**Kreas ŝi modon**

**por si kun plezur'.**

**Ŝi montras sin eĉ nuda,**

**sed pozas ne nur.**

**Sentimas tre Beth**

**pro granda kuraĝ.'**

**Por dikaj ŝi ĝravas,**

**por ĉiuj, pro saĝ'.**

# Eto

## Kaŝa amo

sen ajna motiv'  
mi volas vere  
troviĝi jen apud ŝi  
ĉiam libere

mi ja ne scias  
ĉu mi pretere  
falas en amon al ŝi  
kaŝe prefere

kiam mi fermas  
okulojn jame  
mi vidas ŝin aliri  
ridete ame

tiam mia kor'  
ekbrulas flame  
impulso ekleviĝas  
elpuŝe rame

sed vid-al-vide  
renkonte al ŝi  
mi jam dronas en stupor'  
sen am-fantazi'

**mi konfuzitas  
sen ajna konsci'  
pri am-deklar' perbuŝa  
al beleta ŝi**

**tial mi kaŝas  
ŝin devigite  
en mia korprofundo  
ĉiam evite**

**mi nur elektas  
jam senekscite  
la kaŝan amon al ŝi  
ja senmerite**

## **Vejdo**

### **Al mia retamikino Belpura**

okaze de ŝia naskiĝtago 2011

**ĉiuvespere  
en nokta kviet'  
vi ja sendas saluton  
per la interret'**

**vi ne impresas  
per vanga koket'  
sed per arĝenta voĉ' al**

**babila duet'**

**en ĉi gaja hor'  
al vi Belpura  
mi sendas bondeziron  
kun sent' plezura**

**akompanu vin  
feliĉo nura  
kaj sentimento ĝoja  
en viv' futura**

### **Memfida leporo**

**okaze de la naskiĝtago de Anniespera (2011)**

**Post vetkurado  
testud-lepora,  
ŝi ja korŝire pentis  
per plendo plora.**

**Ŝi do komencis  
per ag' fervora  
fosadi sian sulkon  
en pen' labora.**

**Ŝi kalkulas pri  
fosa progreso  
jen kun trankvila koro  
kun intereso.**

**En sia nesto  
pensas sen ĉeso  
ŝi, kiel diligentas  
ŝi por sukceso.**

**De sekva tago  
kun klara celo  
ŝi ekzercas sin kuri  
en suna helo.**

**Ŝi volas montri  
per arta belo  
superecon en onta  
kura duelo.**

**Ĉio dependas  
de asiduo,  
nek de fanfaronado  
nek de kri-bruo.**

**Plej bone ridas  
en tempa fluo  
kiu ridas ja laste  
kun dolĉa ĝuo.**

# Caisangzi

## (Moruskolektanta Knabino)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de  
74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa, a,a. (x=senrima)

### Yanke

#### Nokta nebulo

**falas nokta nebulo  
tre leĝera  
tre ĥimera  
super fluo rivera**

**lampoj lumas en svago  
jen prospera  
jen malvera  
kun koloro butera**



# Chaitoufeng

## (Feniksa Harpinglo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po ok versoj de 3,3,7; 3,3, 44, 1, 1\*, 1\* silaboj, kun rimaranĝo de aaa, bbxbBB kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.

### **Guozhu**

#### **Wuhan Post Pluvo en Paneo**

**Vespera,/ sufera/, strato iĝis rivera.**

**Pluveg' tre/ ĝenas ke/ aŭtobusa/ ĉie pane'/**

**Ve,ve,ve!**

**Mizera,/ kolera,/ popol' post pluv'severa**

**plendas tre/ urĝas ke/ dren-sistemo/ ĉu al**

**pere'?!/ Ne, ne, ne!**

*Noto:*

*2011-06-18 dum enurba veturo renkontis pluvegon.*

*Inundo sur stratoj. Aŭtobusoj paneas. Trafiko ŝtopiĝas.*

*Urbanoj post 5-6 horoj da veturo ankoraŭ ne povas*

*reveni hejmen, sentas urĝon en veturilo sen necesejo.*

*Multaj plendoj tra la varma linio al urboestro. Dum la senhelpa atendado mi versis ĉineskon Chaitoufen.*

# Changxiangsi

## (Longa Sopiĉo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de  
3, 3, 7, 5 silaboj kun kontinua rimo.

**Cindy Mckee (Usono)**

### **Impreso de observanto**

**Sukceso  
sen ĉeso  
dum la ĵusa kongreso,  
per ĉies jeso.**

**Forgeso  
je preso  
aŭ mirinda progreso,  
mia impresio.**

**Niunio**

### **En kamparo**

**aero  
kaj tero  
tre freŝaj kun sukero  
vera prefero**

vespero  
hîmero  
jen sen viva severo  
kora leĝero

## Sero

### Sopire al mia floro

mia flor'  
en la for'  
ĉiam restas en la kor'  
jen je ĉiu hor'

mia flor'  
en sunglor'  
sane kreskas kun fervor'  
en bunta kolor'



# Chaozhongcuo

## (Pedanta Klerulo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj  
respektive de 7,5,66 / 444,66 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa  
/ xxa,xa (x=senrima).

### Yanke

#### Monologo de herbo

**ne alloga kiel flor’  
nek kun bonodor’  
mi ja vivas simple  
nur en suna lumglor’**

**mi nur havas  
la deziron  
per verd-kolor’  
ornami l’ printempon  
kun tempo kiel or’**



## Chounu'er (Malbela Sklavo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de  
74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a. (x=senrima)

### Cezar (Germanujo)

#### Fuĝemulo foriras

(vera travivaĵo)

**Novaĵ' en mia urbo.  
Mi senspiras,  
ĝoje diras:  
El fi-land' mi foriras.**

**Sed sekretpolicisto  
antaŭdiras:  
Li deliras,  
pri revland' nur sopiras!**

### Cindy Mckee (Usono)

#### Malbela maldemokrato

**Sklavo ĉiam malbelas  
pro la stato.  
Kaj soldato-  
samtipa ekspluato.**

**Kion fari aŭ diri?**

**Sen debato  
aŭ traktato  
ĉenas nin burokrato.**

## **Guozhu**

### **Burokrato foriris**

**Novaĵo el Pekino.  
Oni diras,  
maladmiras:  
Preterpasant' foriras.**

**Kant' de Song-dinastio  
antaŭ-diras,  
saĝe diras:  
Malbeninda foriras!**



Daolianzi

(Kanto de Lavantino)

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ  
rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)

**Cindy Mckee (Usono)**

**En la momento mem**

**Persiko  
en teo.  
En gorgo jubileo.  
Mi ne mokas suferojn  
nek deliras per neo.**

**Persiko  
en teo,  
ĝoja en spontaneo.  
Mi ne konas la ravon,  
fajfas pri panaceo!**

**Persiko  
en teo,  
deĉina du-ŝoseo  
amoras mian langon,  
igas *nunon* solkreo.**

# Eto

## Sabla ŝtormo

bruneta  
vualo  
kun fajna sabla falo  
pendas super rivero  
tero kaj loĝkvartalo

forfuĝas  
la homoj  
per sableroj la domoj  
kovriĝas hermetike  
sub prem' de sablaj vomoj

kial do  
al mondo  
terura sabla ondo  
ofte faras atakojn  
nur homar' kun respondo



# Dianjiangchun

## (Ruĝigitaj Lipoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj  
respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj, laŭ rimaranĝo  
xa,a,a / xa,xa,a (x=senrima)

### Eto

#### Hundvosto

sur la kampo  
hundvosto vibras en sku'  
en venta bru'  
kun vivĝoja ĝu'

eta herbo  
sen ajna enu'  
jen viglas  
kaj vivas nu  
spite al frostflu'



## Dielianhua

### (Papilio Super Floroj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de  
7,45,7,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,a (x=senrima)

#### **Cezar (Germanujo)**

##### **Papilio super flor'**

La papili' super flor'  
ensorĉite  
flugas kun ador'  
enmeze de la odor'  
kun ege vigla fervor'.

Staras, flava laŭ kolor',  
kun enuo  
spite al ador',  
kapriceme laŭ humor',  
fiere bele la flor'.

#### **Eto**

##### **En mia sino**

Vi softe en mia sin'  
senparola  
nestas kun kapklin'.

**Min nure regas fascin'  
de via depend-inklin'.**

**En mia memor-domin'  
restas kun vi  
nur svelta bikin',  
inter mamoj la ravin'  
kaj lipoj de karmezin'.**



超 [www.3lian.com](http://www.3lian.com)

# Dingfengbo

## (Subigo de Ŝtormo)

Ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj  
respektive de 7,7;7,2;7;/ 7,2;7,2;7; silaboj, laŭ rimarĝo  
aabba/ccdeed

**Cindy Mckee (Usono)**

### **Mi portis poŝtelefonon**

**Sur monto de prauloj  
envolvis nin nebuloj  
alkroĉante malseke,  
veke  
al instinktaj stimuloj.**

**Sed super solorajto,  
trajto  
konebla kun precizo  
en la informepoko,  
loko-  
per geolokalizo.**

*geolocate: geolokalizi*

*geolocation: 1. La trovita loko: geoloko 2. La tekniko: geolokalizo*

*geolocator: geolokalizilo*

## Fendieer (Papilio)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun po 8 versoj de 10,34,334,36 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xxa,xa (x=senrima)

### Sero

#### Feliĉeco estas papilio

**Feliĉeco estas papilio.**

**Ĝi flirtas**

**en vario**

**nefore,**

**se ĉasas**

**kun pasio**

**vi jen por**

**kapti sen premio.**

**Tamen en la kvieta medio,**

**sidiĝas**

**sen ansio**

**vi pace,**

**ĝi falas**

**per flug-skio**

**jen sur vin**

**en ĝoja ebrio.**

# Fengrusong

## (Vento Inter Pinoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj  
respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ  
rimaranĝo a,a,xxa,xa /a,a,xa,xa (x=senrima)

### **Cindy Mckee (Usono)**

#### **Jarjuna majo**

**Majo estas profeto,  
juna poeto  
kiu verkas blankverse  
divenojn.  
Nur kupleto,  
majece plena je  
jara malkompleto.**

**Majo estas tapeto  
sorĉa sub treto  
kiu flugas nefore.  
Nur pinta pirueto.  
Pasaĝeroj alas  
junia impeto.**

## **Eto**

### **Maja nokto**

**junaj herboj en kviet'  
sen homa surtret'  
sterniĝas ĝis malproksim'  
senbrue  
per briloĝet'  
lampiroj jen flugas  
flagre super vojstret'**

**dolĉa anima duet'  
kun korpa almet'  
ludas en kor-koncerto  
fole per tona impet'  
koroj reciprokas  
mesaĝojn en sekret'**

## **Vejdo**

### **Amo sen vortoj**

**dediĉe al Patrino Tago 2011**

#### **I.**

**de beba unua kri'  
kun zorgemo vi  
flegadas min senĉese  
silente**

**sed kun konsci'  
pri mia plenkresko  
en saniga medi'**

**de mia unua sci'  
ĉe sojl' de soci'  
vi silente observas  
jen sen ajna apati'  
mian kondutadon  
per milda am-magi'**

## **II.**

**vi ĉiame en silent'  
ĉe ĉiu event'  
sur mia viva vojo  
rigardas  
jen kun atent'  
miajn progresojn kaj  
falojn indajn je pent'**

**kun profunda sentiment'  
kaj buked-prezent'  
mi dankas al vi patrin'  
per sincera kompliment'  
pro granda senvortec'  
en ĉi ĝoja moment'**

## Viktoro

### Maja allogo

knabinoj kiel magnet'  
kun ĉarma koket'  
ornamas sin alloge  
per bela  
la tualet'  
jam sin ekipas per  
seksalloga komplet'

pufaj mamoj per obsed'  
de sorĉa ripet'  
altiras vidojn virajn  
celajn je ina sekret'  
jam ne plu povantajn  
sin teni en kviet'



## Genglouzi (Kanto de

## AkvaHorloĝo en Nokto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po ses versoj de  
33,6;33,5; / 33,6;33,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xaa,xbb /  
xcc,xdd (x=senrima)

### **Sero**

#### **Skizo pri stepo**

**blanko sub  
lazuro  
ondas kun plezuro  
sur tapiŝ'  
la verda  
sen mov' inertia**

**la flava  
koloro  
kiel brila oro  
punktitas  
kviete  
dolĉe ridete**

# Guizhixiang

## (Aroma Laŭbranĉo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 4,  
54, 64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj, laŭ rimaranĝo  
a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xxa (x=senrima)

### Eto

#### Floroj de aroma osmanto

sub suna glor'  
skuata en vent'  
jam pretas flor'  
prezenti al la mond'  
bildon de or'  
jen kun pompa prospero  
abeloj  
jam en labor'  
zumas fluge  
ĉirkaŭ burĝon'  
por ekesplor'

finfine ja kun fervor'  
aperas floroj  
en flav-kolor'  
kun la kapturiga  
dolĉa odor'

**por allogi spektantojn  
la arom'  
en ĉiu hor'  
delikate  
filteriĝas  
ĝis homa kor'**



## Haoshijin

### (Proksimiĝas Bona Afero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de  
56,65 / 75,65 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x =  
senrima)

### Cezar (Germanujo)

#### Birdosonĝo

En dorm' ankoraŭ,  
en bela sonĝ' en blu'  
mi laŭte ektrilas  
matene en fru'.

Mi estas urba birdo  
en strato sen bru'.  
Jubile mi kantas  
kun ĝojo kaj ĝu'.

### Guozhu

#### Bona afero

Ni geamikoj  
gratule kunvenas,  
pro via transloĝo.  
Nasktage benas

**al Aĝa Fratino Ma.  
Feliĉoj plenas.  
Je la jubileo  
ora festenas.**

**Zhuang Qixiong**

### **Al Estimata Amikino en Estonio**

**Kun sorĉa rimo  
mistera Estoni'  
libere prosperu  
kontraŭ novdefi'**

**Disfloras amikeco  
en gloro, magi'  
Paduso odoru  
tra granda Ĉini'**



# Heshengchao

## (Gratulo al Sankta Dinastio)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj 4 kaj 5 versoj  
respektive de 7,5,75 / 44,5,75 silaboj, laŭ rimaranĝo  
a,a,xa / xa,a,xa (x=senrima)

### Niuniu

#### Forgeso je maljuniĝo

**Je maljuniĝ' forgeso  
regas sen ĉeso.  
Malklaras en memoro  
ĉio per deso.**

**Mi lasu do  
sen progreso.  
Troa eksceso  
faligos min, nur ripoz'  
estas neceso.**



## Heyebai (Lotusfolia Taso)

ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 6,2:3;7,2;3 silaboj,  
laŭ rimarangô aab,ccb

### Sero

#### Konvulvulo

**ĝi kun koketa bel'  
sen cel'  
rampas jen  
alien jen tien ĉi  
ha, ĝi  
ja sen ĝen'**

**kun bunta funelflor'  
ĝi por  
fanfaron'  
trumpetas plenespere  
vere  
per vant-ton'**



Huanxisha

(Silk-lava Rojo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po tri versoj de  
sep silaboj laŭ rimaranĝo aaa / xaa (x=senrima)

**Cindy Mckee (Usono)**

**Zongzi al mia plum-feo**

**Sukplenan sanan rizon,  
laŭfluan helpan brizon,  
ĝardenan paradizon/**

**Bonojn al dista feo!  
Skribe vi ŝanĝas grizon  
en ĝoj-buntan surprizon**

**Guozhu**

**Al Cindy**

(2011-06-07)

**al Cindy dankon benan,  
zonzi-on specimenan,  
sanan rizon sukplenan,**

**Bonojn al plum-feino!  
ĉineskon kor-komprenan,**

**paradizon ĝardenan!**

**Su Shi (1037-1101)**

**Fein' tenera**

**Tra vesto ŝvit' leĝera.  
Morgaŭ baniĝ' libera.  
Ŝvebas arom' rivera.**

**Bunta fadeno volvas  
jadbrakon esotera.  
Ravas fein' tenera.**

elĉinigi Guozhu

**Viktoro**

**Gratulon al Li Na**

**Bona novaĵ' el Franci'  
tiras ĉinojn al pasi'  
al ĝoja huraa kri'.**

**Vi ŝlema ĉampiono  
en la ĉina histori'  
famiĝas per glor-radi' .**

\*Li Na gajnis ĉampionon en tenisa turniro de la granda ŝlemo en Francio la 4-an de junio de la 2011-a jaro.

# Jiangnanchun

## (Printempo Sude de Rivero)

ĉina fikforma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj, laŭ  
rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

### **Vejdo**

#### **Helena, pli juna**


okaze de ŝia naskiĝtago 2011

**Ho, kara  
Helena,  
mi gratulas vin  
per versoj benaj  
ĉineskaj plenaj je am'  
ĉe ĉi moment' solena.**

**Ankoraŭ  
kun fervor'  
vi tradukas kaj  
versas per la kor'  
por nia kara lingvo  
kaj diligenta labor'.**

**Pli sana  
kaj juna  
mi deziru vin**

**kun ardo suna.  
Ni penu persisteme  
por l' afero komuna.**



# Langtaosha

## (Ondo Lavas Sablojn)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de  
5,4,7,74 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa (x=senrima)

### **Niuniu**

#### **Neĝa festeno**

**neĝblanka festen’  
sur la teren’  
aranĝiĝas en solen’  
aŭdiĝas ne maĉado  
nur bela scen’**

**bonvola kompren’  
pura sentplen’  
foriĝis jam la ĉagren’  
restas nur kor-elverŝo  
sen ajna ĝen’**

# Litingyan

## (Hirundo ĉe Kiosko)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 6 versoj de 66,  
76, 56 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

## Cindy Mckee (Usono)

### Vi montras familion

**Trankvilaj esprimoj:  
al morto, scia klin',  
al vivo vi rektiĝas.  
Ŝi vivas en la sin',  
en la sin' de vi,  
familio sen fin'.**

**Kurbiĝoj de fingroj  
ekde la origin'.  
Miloj da mildaj fingroj  
super la granda sin'.  
Portita en vi,  
familio sen fin'.**

### La vivo nun

**Pri la nuna tago  
estu sana fascin'.  
La celo kaj memoro**

**estu niaj destin'  
kaj muldilo de  
nia fina difin'.**

**Nuna suno estas  
la nura ilumin'.  
Nia vivo estas nun.  
Pli simple ol doktrin':  
en nia nuno  
estas neniu fin'.**

## **Vejdo**

### **Funebre pri mia kuzino**

**fulme malaperis  
mia kara kuzin'  
forportite de kancer'  
laŭ malbona destin'  
spite al via  
barakto de obstin'**

**via serena rid'  
vere kortuŝas min  
plue en ontaj tagoj  
nek rev' nek halucin'  
ni vivas kune  
certe daŭre sen fin'**

## **Gravas vivi**

**ha, vi vere pravas  
sur la morta ruin'  
vivantoj devas vivi  
kun persista obstin'  
ŝi jam troviĝas  
profunde en la sin'**

**lerni kaj labori  
estas viviga vin'  
ni ja daŭre klopodu  
al celo ĝis viv-fin'  
se vivante plu  
ni agu kun sangvin'**

## **Vivo belas**

**nuna vivo belas  
pro alloga fascin':  
fervora amuziĝo  
al komforto inklin'  
ĝua manĝado  
flirtado kun fraŭlin'**

**sed plej gravas tio:  
ĉasadi kun obstin'  
la deziratan celon  
strebi sen halucin'**

**agi reale  
fari paŝojn sen fin'**



[www.3lian.com](http://www.3lian.com)

# Linjiangxian (Feo ĉe Rivero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de  
66,7,55 laŭ rimaranĝo xa,a,xa (x=senrima)

## Zhuang Qixiong

### Ĉina Saĝo

(Gratulon al 16-a Seminario de Hubei-a  
Esperanto-Asocio)

**Elitoj disvastigas  
E-on en nova vent'  
sub verd-flag' kun rid-moment',  
de antikveco  
ĝis Zamen-talent'.**

**Saĝa Konfuzi', Tao'  
kaj Zen' kun Ŝanĝa tent'.  
Ĉiuj brilos pro torent'.  
Per Ĉina trezor',  
al homara sent'.**

# Manjiangong

## (Rivero Plenruĝa)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de  
434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ  
rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa (x =  
senrima)

## **Eĉino**

### **IEK 2011**

(2011-04-18/23)

**Kurantjara/ IEK/ en Ĉinio.**

**Rekorda/ kre' en ĝia/ historio.**

**Interkona Vespero: / Kantoj, danc' kun gracio,  
donaco/ akrostika al/ podio.**

**Programa/ vario.**

**Prelega/ serio**

**pri doktrinoj kaj/ religio.**

**Por / lanĉa ceremonio.**

**Al roman' / premio!**

## **Vejdo**

### **Por fina konker'**

**okaze de Zamenhof-Festo 2010**

**ankaŭ kun sent’  
la nova  
jen al esper’  
ni strebas  
verdaj fratoj  
jen kun fier’  
antaŭenmarŝu rekte  
por nia granda afer’  
senĉese  
ni pene agu  
kun sincer’**

**demono  
sur la ter’  
ankoraŭ  
kun danĝer’  
tigre minacas  
kaj la kancer’  
en nia korp’ intrigas  
kontraŭ esperanta kler’  
rapide  
ni unuiĝu  
por konker’**

### **Verda Motoro**

**omaĝe al 60-jariĝo de ĈEL  
Ses dek jaroj  
forpasis**

**kun verda glor’.  
Jubile’  
celebrata  
en nuna hor’  
ĝojigas geadeptojn.  
Manklakoj, ĝoja rumor’,  
sub flago  
verdstela ĵuro  
jen el kor’.**

**Vi jame  
la motor’  
fariĝis  
per labor’  
la persistema.  
Penu en ĥor’  
ĉinaj samideanoj  
junaj, oldaj kun fervor’  
por nia  
afero verda  
al flug-sor’.**

## **Memportreto**

**okaze de mia naskiĝtago 2011**

**kun fervoro  
arda kaj  
multa peno  
kultivas**

**mi kampule  
sur tereno  
esperantuja verda  
ardue sen ĉagreno  
nek pento  
por rikolto kun  
ŝvit-pleno**

**humora  
sereno  
kaj gaja  
mieno  
bone sanigas  
min sen spleno  
mi verkas diligente  
kun ĉineska kompreno  
por paŝi  
al la parnasa  
festeno**



## Moyuer (Fiŝado)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 12 versoj de  
346, 76, 3, 37, 4, 545 / 36, 6, 76, 3, 37, 4, 545 silaboj,  
laŭ rimaranĝo xxa,xa,a,xa,a,xxa / xa,a,xa,a,xa,a,xxa  
(x=snrima)


## Sero

### Vizio en sonĝo

**en sonĝo  
mi hazade  
renkontiĝas kun ŝi  
bela kaj delikata  
blanka kiel lili'  
de juli'  
ŝi ridas  
arĝent-tintile al mi  
kun fantazi'  
mi dronas blinde  
pro ŝia ĉarm'  
en ĝoja ebri'**

**mi ne plu  
eltenas kun pasi'  
kaj juna energi'  
al ŝi mi min alĵetas  
sen ioma konsci'**

**pro magi'  
alloga  
mi ŝin kisas kun mani'  
kaj emoci'  
mi peze falas  
el la lito  
ha, songê-iluzi'**



超 [www.3lian.com](http://www.3lian.com)

## Nangezi (Suda Kanto)

ĉina fiksforma poemo el 4 versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ  
rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

**Cindy Mckee (Usono)**

### **Kiam la suno aperos?**

**Herboj frenezas  
nokte, sen suno.  
Ili bruskas en bruno  
sub simulanta luno.**

**Homaj herbidoj  
sen suna brilo  
frenezas sen stabilo,  
karnaj filoj de klorofilo.**

### **Al seks-maŝino**

**Mi ŝatas fiki  
samkiel ĉiu  
tamen al ŝi mi krii,  
ne erotomanii.**

**Grimpu montaron,  
televiziu,  
bonvole pli hobiu.  
Bonegan menson ne mumiu!**

## Lily

### Longa kiso

Lia longa kis'  
logas min forte  
amoĝui komforte  
mi ne forgesas ĝin ĝismorte.

Sento jukema  
fluas rapide  
tra korpo sentimide  
kaj am-fajro brulas senbride.

Volupto vokas  
al lud' surlita  
kun karno-spert' ekscita  
kun lia eniro invita.

### Eroto

eroto ŝprucas  
dum ajna moment'  
jen kun amora eksent'  
necesaĵ' de viva moviment'

ĝi ne lanĉitas  
per fera maŝin'  
sed pro amora inklin'

**al aliseksulo kun obstin'**

**kial ĝin regi?  
ĝuu ĝissate  
buntan vivon laŭŝate  
domaĝu ĝin iniciate**

**Niuniu**

### **Matenaj rosoj**

**matenaj rosoj  
premas kun pezo  
herbojn en anestezo  
dorma pro tranokta frenezo**

**matenaj rosoj  
rebrilas sub sun'  
jam senforta dum aŭtun'  
kaj malgrandiĝas plie jam nun**

**matenaj rosoj  
jen efemeris  
ĉar taglumo aperas  
pri beleco ne plu fieras**

## Nanxiangzi (Sudlandano)

Ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun po kvin versoj de 5,7,7,2,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a (x=senrima)

### **Veĵdo**

#### **Al Ŭel, mia brazila amiko**

okaze de lia naskiĝtago 2011

**kara frato Ŭel  
kun verdakora fidel'  
pene faras versojn de  
juvel'  
jen per Esperanta bel'**

**l' agema Abel'  
diligentas sen anhel'  
en parnasa ĝarden' de  
fabel'  
por nutroriĉa miel'**

# Niannujiao

## (Ĉarma Kantistino)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de  
436, 436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimarangô  
xxa, xxa,xxa,xa (x = senrima)

### Eto

#### Sopire al Ann

**For en nordo  
ŝi kara  
ĝenas min per sopir'.  
Ŝiaj rido  
kaj petol'  
rongâs min per disŝir'.  
En mia mens'  
ŝi turniĝas  
ĉiam kun altir'  
neviŝeble  
eĉ per fortega ŝmir'.**

**Ŝi ofte vekas min  
en mia imag'  
per am-aspir'  
necedeme  
kokete.**

**Ŝia trankvila spir’  
sentigas min  
rave fascina  
eĉ en delir’  
mia sonĝa  
kune kun ve-suspir’.**

**Guozhu**

### **JARKUNVENO de HEA 2010**

**Jarfine en/ decembro/ sub Zamenhof-beno,  
laŭkutime/ okazis/ nia jarkunveno.  
La Espero./ Verda flago./ Raport-bulteno.  
Kunfotiĝo/ en festa soleno.//**

**Poem-deklamo far/ la Esemblo en/ voĉ-sereno.  
Ho, Mia Kor'! / impone/ emocia sceno.  
Glata ŝanĝo/ de komitatoj/ en ordpleno.  
Al nova cel',/ marŝu ni kun peno!**

**Zhuang Qixiong**

### **Ĉina Ideogramo**

**En montaro  
penikas  
de sur ĉina paper’  
Pro nova tem’**

**nur tuĉo  
fluas kiel river’  
La kvadrata  
ideogram’  
kun bilda prefer’  
Per belskribad’  
por ĉina artfier’**

**Delikata vorto  
inke furoras  
sur vasta ter’  
Pluvovento  
ploretas  
pri pasinta mizer’  
Ĝi retnaĝas  
kontraŭ fantomo  
pro vivesper’  
Per peniko al mistera prosper’**



# Pozhenzi

## (Kavalira Danco)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de  
66,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x = senrima)

### **Yanke**

#### **Ĝojo de herbo**

**Ĝi skuas la kapon  
en friska zefiro  
pli malpli rapideme  
por poeta inspiro  
jen per admiro.**

**Ĝi etendas kolon  
en kreska eltiro  
kun june hela verdo  
sen ajna kota ŝmiro.  
Ha, kia spiro!**



# Pusaman

## (Budhista Dancisto)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de  
7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo

### Niuniu

#### **Neĝo en nordo**

**neĝo sana kaj pura  
en nordlando natura  
kuŝas kviete  
blanke kokete**

**kun fajna mildo  
de kreta bildo  
kun voĉa softo  
de paŝa ofto**



# Queqiaoxian

## (Feino sur Piga Ponto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 6 versoj de  
446, 734 silaboj, laŭ rimarangô xxa,xxa (x=senrima)

### **Vejdo**

#### **Ĉineska feino en nordo**

okaze de la naskiĝtago de Cindy Mckee (2011)

##### **I.**

**en la nordo  
vi disverŝas  
abele kun fervor'  
semojn de ĉin-poemoj  
la muzon  
vekas el kor'**

**en nubaro  
aŭ en montoj  
por peniga labor'  
vi fosas, akvumas kaj  
kultivas  
en ĉiu hor'**

##### **II.**

**spite al vent'**

**al pluvego  
kaj eĉ al tempesto  
vi zorgeme protektas  
plantidojn  
de molesto**

**venas rikolt’  
de poezi’  
por fina investo  
vi ŝvitas sin pretigi  
sincere  
por la festo**



www.31ien.com

## Santaici (Tri Terasoj)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de ses silaboj kun krucrimo.

### Cezar (Germanujo)

#### Obama kaj Osama

Per terora murdo  
mortis teroristo.  
Estis "nur" Osama,  
lau usona listo.

### Cindy Mckee (Usono)

#### Ripoztago

Dimanĉo demande  
oazmiksas mondojn  
hom- kaj herb-faritajn.  
Lukros lund' respondojn.

#### Agnosko de normaleco

Arĝenta filiko  
al planto verdblonda  
blanke riverencis  
per nuanco fronda

(mi legis la figurajn difinojn de 'blanka' en PIV)

Anglalingva versio:

**Acknowledgement of Normalcy**  
in the tradition of Ci, form Santaici (Three  
Terraces)

A silver and gray fern  
to a plant greenish blonde  
bowed ever so whitely  
with a nuance-full frond

### **Teroro**

**Ni meritas morti —  
kelkaj pli meritas.  
Mortperantoj perdas  
korpon, ĉu spiritas?**

**Solvu la spiriton  
Dio, se Vi estas,  
do murdemon ili  
jam ne manifestas.**

### **Venĝo venĝas venĝon - bin Laden**

**Kontento venis per  
venĝplena respondo.  
Sed la venko estas  
nur venena rondo.**

## **Eto**

### **Ruĝaj folioj**

**Folioj ruĝiĝas  
laŭ bordoj de l' river'  
kiel farb' skarлата  
ŝpruciĝas super ter'.**

**Ĉu montoj kaj tero  
sub la ruĝa tolo?  
Ĉu karminaj nuboj  
onde en ventfolo?**

**Kun ruĝ' prezentas  
la pejzaĝon l' amo.  
Paron ebriigas  
bela panoramo.**

### **Kia mondo!**

**Knab' senĝene vagas  
kvazaŭ vagabondo  
sen cerbum' zorgema  
pri la nuna mondo.**

**Brulas fajr' milita  
Ĝuste ĉe la fronto.  
Li sentime iras**

**Ĝis tumulta rondo.**

**Ve, lin trafas kuglo  
al lia renkonto.  
Li ne scias ĉe mort'  
tion. Kia mondo!**

**Lily**

### **Blanka edziĝo**

**amata edzino  
mia kun har' en blond'  
min evitas dorme  
pro la seka am-font'**

**mia kaco vane  
staras kun granda hont'  
mizere kaj pete  
eĉ por sek-frota sond'**

**mi altiras forte  
ŝin malgraŭ malvolont'  
ho ve, ŝi rezistas  
per la dorsa renkont'**

**tagon post tago min  
trafas nea respond'  
ŝia kaj mi vere**

**dronas en desapont'**

**min atakas pike  
la seks-impulsa ond'  
ĉu mi devu tiri  
min el blanka seks-rond'?**

## **Vejdo**

### **Mevo**

**Alte ĝi rondflugas  
super bluaj ondoj,  
jen al maro suben  
tranĉas ĝin per tondoj.**

## **Viktoro**

### **Decidemo**

**eĉ se mi donitas  
per alta honoro  
kaj granda monsumo  
mi ja kun ignoro**

**forĵetos tiaĵojn  
por kunĝui nure  
kun vi ununoktan  
dolĉecon plezure**

## Laden mortis

Mortis li kun mavoj  
profunden en ondojn.  
Ĉu teror' seniĝas?  
volas ni respondojn.

## Revo

Jam dum dudek jaroj  
vi kaj mi en renkont'  
rendevuas kare  
dolĉe sen ajna hont'.

Sed dumtage ĉio  
je mia desapont'  
malaperas tute  
kiel mortinta ond'.

Deziregas mi ja  
ke la ekstaza songê'  
daŭru kiel inte  
ĉiuhore en ont'.



# Shaonianyou

## (Vojaĝo en Juneco)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de  
7,5,445 /75,445 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa / xa,xxa  
(x= senrima)

### **Vejdo**

#### **Neforgesebla knabeco**

okaze de Infana Tago 2011

##### **I.**

**neviŝebla l' rememor'  
pri knabeca flor'  
sen ĉagreno  
sen zorgemo  
nur kun ĝoja kor'**

**neforgeseblaj jaroj  
sen ajna rankor'  
sen ĝismorta  
malamikec'  
nur kun ted-ignor'**

##### **II.**

**jen sub sunlumo taga  
revo imaga**

**en mia mens’  
turniĝadas  
en iro vaga**

**idealo grandega  
laŭ voj’ zigzaga  
jen varias  
jen kapricas  
sen faro aga**



# Shengshengman

## (Lanta Sontreniĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 10 versoj  
respektive de 4,46,64,634,336 / 6,36,46,634,37 silaboj,  
laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xa (x =  
senrima)

### **Viktoro**

#### **Vintro**

**en ĉi sezon’  
mi ne volas  
vin vidi per person’.  
oni plumpan vidon  
kun neĝa fon’  
prezentas mallerte  
pezege.  
kun knara son’  
paŝadas  
pasantoj  
sur la blanka gazon’.**

**mi petas kun pardon’  
jen al vi  
ĉar dura kiel ŝton’  
vest-kiraso.**

**mi havas je dispon'  
la penetran povon  
nek povas  
iri kun kron'  
en koron  
vian de varma impon'.**



# Shiliuziling

## (Dekses-Silabo)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj,  
laŭ rimarangô a,a,xa (x=senrima)

**Cindy Mckee (Usono)**

### **Gutotrafo apud malplena puto**

**Jam  
verdaĵoj vivis kiam  
viveblis.  
Ni manĝis tiam.**

**Eĉ  
se pluvus, pluvus sur feĉ'  
praviva  
en alputa streĉ'.**

**Ne.  
Tro malfruas post malkre'.  
Ne eblas,  
pluvo sur pase'.**

*\*alputa = al + puto. Ni streĉas nin por atingi akvon  
en puto.*

# Mandio

## Soifo

**Sun'**  
bakadas kun arda lum'  
senĉese  
tre longe ĝis nun.

**Vent'**  
ne ekblovas en silent'  
longtempe  
sen ajna ostent'.

**Roj'**  
ne plu fluadas kun ĝoj'  
pro manko  
de akv' en ĉi foj'.

**Ter'**  
jam sekiĝis en mizer'  
krevante  
sub varma sever'.

**Hom'**  
sopiras al pluva gnom'  
peteme  
por akva elvom'.

**Ho,  
natura jam agas tro.  
Homa mond',  
kion fari do?**



# Shuidiaogetou

## (Preludo de Akva Melodio)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 9 kaj 10 versoj  
respektive de 55, 65, 665, 55/333, 47, 665, 55 silaboj laŭ  
rimaranĝo de xa, xa, xxa, xa / xxa, xa, xxa, xa (x =  
senrima)

### **Guozhu**

#### **Jubileo Berila/ Sub Verda Stelo Brila**

(2011-10-22)

**Ora aŭtuno./ Vento facila.**

**Flirtas verda flago/ kun stelo brila.**

**Venas jubileo/ de esperantistec'/ ĉarme berila.**

**Por nia kara/ Eĉin' humila.**

**okazas/ kunsido/ babila/**

**en etoso/ familie simila.**

**Laŭdas la vers-paro/ kvindek-kvin-silaba/ tipe**

**ĉin-stila./**

**EES kronas/ per kant' jubila.**

## Suzhongqing (Kora Sento)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj  
respektive de 7,5,65 / 33,3,444 silaboj, laŭ rimarangô  
a,a,xa / xa,a,xxa (x=senrima)

### Vejdo

#### Acerfolioj ruĝiĝas

**ruĝiĝas la tuta val'—  
fajreska koral'  
jen l' acerfolioj  
en ĝoj-festival'**

**en ventet'  
foli-fal'  
en spiral'  
jen kirligās  
jen dancetas  
en flirta bal'**



## Tasuoxing (Paŝo sur Herbo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de  
44,7,77 silaboj, laŭ rimarangô de xa,a,a,xa (x=senrima)

### Niuniu

#### Densa nebulo en Pekino

**Ĉe mateno  
jam nebulo  
densa en disflos-rulo  
ŝlosas la urbon blanke.  
Ĉio en bruma lulo.**

**Aŭtoj iras  
kun skrupulo.  
Pro maltrankvila brulo  
pasantoj palpas blinde  
en l' izola insulo.**



## Tiaoxiaoling (Flirta Kanto)

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

**Cindy Mckee (Usono)**

### Transkultura aganto

**Kara, kara  
Vejdo temerara,  
agas verdefide  
edife, edife  
ĉinaĵoj specife.**

**Guozhu**

### Al Vejda

**Vejda, Vejda,  
sub la stelo verda.  
Gratula ĝojveko,  
feliĉa substreko.  
Kore, kore,  
naskiĝtag-memore!**

(2011-10-22)

## Vejdo

### **Dankon**

al vi, al vi  
dankon kun mia pi'  
pro via omaĝo  
al la viv-vojaĝo  
ĝoja, ĝoja  
kun klopod' survoja.



## Wanghaichao

### (Rigardo al Martajdo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de  
446, 446,5,54,47 / 6,54,446,5,54,47 silaboj, laŭ  
rimaranĝo xxa, xxa,a,xa,xa / a,xa,xxa,a,xa,xa (x =  
senrima)

### **Cindy (Mckee (Usono))**

#### **Herbo**

**Ŝi stultumas,  
tiu floro.  
Aspekto modera,  
apudanta,  
plensatiĝus.  
Ĝi, rekte sincera,  
plate papera,  
ruligas roson,  
kiu, sfera,  
premas tiun  
de beleco ekstera.**

**Larĝeco supera  
ŝrumpas dum pluvo  
virvetera.  
Estu rekta**

**kiel vergo,  
fratino surtera.  
Estu severa  
antaŭ la bombo  
atmosfera  
pluvos sur la  
ludejo biosfera.**

**Eto**

### **Larmo de lavendo**

**frumatene  
la lavendo  
bela kaj mistera  
sub la pezo  
de roseroj  
kiel larmo vera  
vento libera  
faligas larmon  
de mizera  
ŝia sperto  
de am' senkonsidera**

**ŝi ne plu fiera  
kun trista purpur'  
ŝajn-tenera  
sian homon  
karmemoran**

**ĉu afer' espera?  
la patro tera  
ĝin klare konas  
ha, sincera  
vi lavendo  
stultu kun kor' sukera**



超 [www.3lian.com](http://www.3lian.com)

# Xijiangyue (Luno super Okcidenta Rivero)

ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de  
66,7,6 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

## **Eĉino**

### **Malo Sen Vualo**

**Jen bona parolo  
pri la aktualo:  
Graseta idealo,  
osteca realo.**

**Absurda epoko,  
stranga anormalo.  
Dekadenca moralo  
ĝis supera skalo.**

2011-06-26



# Yexingchuan

## (Nokta Ŝipvojaĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun ses versoj de  
7,34,446 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xxa (x = senrima)

### Cindy Mckee (Usono)

#### **Direktoj al mi**

**Apud ferruba stako  
turnu vin  
al sur ŝlako-  
pado taŭga.  
Mi kreis ĝin.  
Antaŭ vi, jen lago.**

**En iama barako  
sur stilzoj,  
sen kloako.  
Sur eskalo  
atentiĝu-  
subas akva vako.**

## **Cezar (Germanujo)**

### **Tretataj Tagoj**

**Trotas tretataj tagoj  
senvorte  
kiel plagoj.  
Ĝemoj lacas  
en obtuzo  
sen freŝaj imagoj.**

**Kape eĉ mankas agoj.  
Senfortas  
ĉiuj vagoj.  
Viv' tenacas.  
Tro da ruzo,  
tro gravas la flagoj.**

## **Eto**

### **Vagabonda kantisto**

**I.  
ekde mia forvetur'  
mi kovras  
per mia spur'  
vojojn montajn  
kaj laŭrojajn  
por fola aventur'**

sur vasta step' sen mezur'  
mi dormas  
jen kun plezur'  
en malgranda  
movebla tend'  
en la venta murmur'

## II.

nokte sub la klara lun'  
mi ludas  
per verda jun'  
la gitaron  
kor-trankvile  
ĉe kvieta lagun'

bela knabino ho nun  
ne amas  
min per brakum'  
ĉar mi morgaŭ  
vagabondos  
ree sen via kun'

**Lily**

### **Imaga bildo**

estas en ĉirkaŭbrakum'  
intima

**ni en lunlum'  
varmaj kisoj  
reciprokas  
en ama kvera zum'**

**pasio impetas nun  
ĝis ekstreĵ'  
pele de jun'  
jam kolapsas  
mi ebrie  
ve kun rigida um'**

## **Viktoro**

### **Ni iras sub la luno**

**bele glimanta luno  
en nokto  
kiel skuno  
drivas flose  
en nubaro  
kun blanka kostumo**

**ni iras jen en kuno  
trankvilaj  
en pur-lumo  
tra knabeco  
tra matura  
tra brilanta juno**

## Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)

ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj  
laŭ rimarangô xa,xa,a (x=senrima).

### Cezar (Germanujo)

#### Sopiro

**Sopiro  
sen klara celo,  
jen vokas min la sudo  
al palmoj sub ĉielo,  
al ĝoj' kaj belo.**

**Mi sidas  
sur plaĝo hela,  
insuloj min forlogis,  
feliĉa viv' subvela  
kaj subĉiela.**

**Mi flugis  
kun multaj mevoj  
al lando utopia,  
sen leĝoj kaj sen devoj,  
en miaj revoj.**

## Cindy Mckee (Usono)

### Krepusko sur la vojo

Vekiĝis  
kaj ellitiĝis  
sed malfermi okulojn  
mi forgesis. Sidiĝis,  
infinitiĝis.

Nigriĝis,  
nevidebliĝis.  
En maturaj vivjaroj  
Mi al mi fidebliĝis,  
lucidebliĝis.

(tre amuza alternativa lasta vorto estus 'libidebliĝis')

(pli honesta lasta vorto estus 'ridigebliĝis')

### Reago al Cingming-festo

ĉe tombo  
silenta digno-  
ene brulas kaj pluvas  
cindreroj de indigno-  
ele, rezigno

## **Vejdo**

### **Al Serena (Yoyo)**

okaze de ŝia naskiĝtago 2011

**Saluton,  
kara Serena!  
Vi vivas en sudlando  
kun vetero lumplena  
kaj suno bena.**

**Kial ne  
vivi kun fervor',  
senĝene ĉiutage  
jen kiel sudlanda flor'  
sen ajna dolor'?**

**Ha, kara,  
ne malproksima  
via brila sukceso,  
se vi estas sentima  
el kot' deprima.**

**Ankoraŭ  
budaa favor'  
vin gardas kaj protektas  
en viaj viv' kaj labor'  
je ĉiu temp-hor'.**

**Mi el for'  
deziras al vi  
ĝojon kaj kor-serenon,  
kaj memfidon kun pasi'  
en bona medi'.**

2011-06-13

**Viktoro**

### **Sur vilaĝa vojeto**

**multfoje  
sur la vojeto  
vilaĝa mi paŝadis  
tra pina arbareto  
jen en kvieto**

**mi jame  
pasigis tie  
mian puran knabecon  
petoleme senscie  
sed fantazie**

**ĝis nune  
en mia memor'  
nure restas paseo  
kun senlaca bonhumor'  
kaj plezura hor'**

## Zhuang Qixiong

### Cingming-festo\*

Cindreroj  
ŝvebis en l' aer'.  
Ĉie brulis kaj pluvis.  
Mia patro sub la ter'  
vivas kun sufer'?

*\*Festo je la 4-a aŭ 5-a de aprilo por tombvivo.*

### Ĉu Vere

En sonĝo  
nuda mi sur ter'  
promenis ĉe brila sun'  
Eknigris kiel vesper'  
ĉio en mister'



# Yiqin'e (Memoro pri Palaca Knabino)

ĉina fiksforma poemo de du strofoj kun po 5 versoj de  
3,7,3\*44 / 7,7,3\*,44 silaboj, laŭ rimarangô aaA,xa /  
aaA,xa (x=senrima)

**Cindy Mckee (Usono)**

## **Alparolotoj, la minoritatoj**

**Rezultas,  
ke neniu aŭskultas  
aŭskultas  
nur parolas  
kaj insultas.**

**Porparolantoj multas  
kiuj ne nin konsultas  
konsultas.  
Mutigitaj,  
ni tumultas.**

**Yanke**

## **Spektado al neĝado**

**Sur ĉiel'  
svage brilas jen kun bel'**

**jen kun bel'  
blanka kristal'  
de pika gel'.**

**Vatpecoj sub venta pel'  
flirtas kirle en pelmel'  
en pelmel'  
drivas fume  
falas sen cel'.**



## Yulinling (Tintado en Pluvo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj  
respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35,634,426,345 silaboj,  
laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x =  
senrima)

### Lily

#### Malsukcesa amor’

**Jam pasis for  
la rendevu’.  
En mia kor’  
ankoraŭ impulsas  
mia pasi’.  
Dum tiu hor’  
reciprokis kisoj  
varmaj sen pudor’  
en brakum’  
kaj lang-mordad’  
instigis nin al amor’.**

**Li ĝin elprenis por bor’  
tamen ĝi  
tuje kun langvor’  
falas kaj ekmolis  
kolapsis.  
Blanka likvor’**

**lante fluis  
vane.  
Ho ve, kia sinjor’!  
Kial vi  
impotentis  
antaŭ la klitor’?**

### **Sopire al tiu momento**

**Tiu moment’  
min gajigis  
per granda tent’.  
Sur vila tapiŝo  
ambaŭ nudaj  
oh, sen prudent’  
tordiĝis freneze  
kun pasia sent’  
ĝemkrie  
kver-murmure  
en voluptema ferment’.**

**Li sur mi kun ĝoj-kontent’  
lang-mordis  
kun mana frekvent’  
al mia suba tru’.  
Kolapse  
kun suk-torent’  
mi obeis  
fine.**

**Ĝis orgia prezent'  
mi sciis,  
ke eniras  
min lia serpent'.**



## Yumeiren (Belulino Yu)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.


**Zhuang Qixiong**

### **Vento de Amo**

**Blovetas la milda vent'  
kun aminda sent'.**

**Kiu volas eldiri:  
al kie ĝi povas sopiri?**

**La amo ardas en kor'  
kun ĝojo kaj plor'.  
Per la vento de amo,  
brulos ĉiam espera flamo!**



## Zhuzhici (Bambuoj)

Ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de sep silaboj laŭ  
rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

### **Eto**

#### **Vagabonda bardo**

**de kiam decidis mi  
migri de la famili'  
mi jam restigis spurojn  
miajn tra l' teritori'**

**jen sur la step' senlima  
mia loĝej' kutima  
estas tendo malgranda  
en migrado pilgrima**

**nokte sub brila luno  
mi per voĉo de juno  
kantas akompanate  
de gitaro en kuno**

**oh, vi bela knabino  
ne min kun korinklino  
amas pro mia kantad'  
nek dronas en fascino**

ĉar morgaŭ mi denove  
ekmigros multemove  
en sencela drivado  
ien ajn laŭbontrove

## **Vejdo**

### **Larmanta glacimonto**

**Eklarmas glacimonto.  
Degelis ĝia fronto  
majesta kaj impona  
je ĝia disaponto.**

**Suna arda lumgloro  
brulvundas per doloro  
okulojn ŝiajn belajn  
ĉiam en ĉiu horo.**

**La glaci-akvo lante  
fluas foren lirlante  
al la maro sala  
senĉese konstante.**

**Malkaŝas ŝia larmfluo  
la misteron sub volb-blu'.  
Ŝi jam perdis majeston  
en la polusa situ'.**

**Abomeninda varmo  
de fluorida svarmo  
rapidigas degelon  
glacian per malcarmo.**



# Cikloj

## Vejdo

### Impresoj pri Huangshui

*Kune kun retamikoj mi vojaĝis al la nacia  
arbara parko Huangshui, kie troviĝas unika  
natura pejzaĝo.*

#### 1. Survoje

—laŭ ĉineska skemo Haoshijin<sup>1</sup>

buse vojaĝis  
ni ja kun ĝoja kor'  
gaje babilante  
al vidinda for'

la voj' zigzakis supren  
en spirala sor'  
ni preskaŭ senspiris  
en stulta stupor'

#### 2. Vasta herbejo

—laŭ ĉineska skemo Shanhuazi<sup>2</sup>

vastas ĝi senmezure  
verdaj herboj plezure  
loĝas senpolucie  
kaj pure

sterniĝas larĝa tapiŝ'  
loge al dormo nure  
kun zefiro blovanta  
murmure

### 3. Verda pulmo

—laŭ ĉineska skemo Yijianmei<sup>3</sup>

pinoj altas ĝis ĉiel'  
kvazaŭ muro  
en verda bel'  
la riĉan oksigenon  
jen elspiras  
por sana cel'

pro freneza urba ŝvel'  
furiozas  
noca kruel'  
gravas ja l' verda pulmo  
por la urba  
eko-fidel'

### 4. Ŝtona miraklo

—laŭ ĉineska skemo Jiangnanchun<sup>4</sup>

ŝoviĝas  
el la ter'  
kretaj rokegoj  
duraj kiel fer'  
pikaj kiel ponardoj

**jen la natura fier’**

**mirakla  
bela ver’  
sin montras ĉie  
en pompa prosper’  
karsta pejzaĝo ĉarma  
restas kiel en ĥimer’**

### **5. Venta fortreso**

**—laŭ ĉineska skemo Fengrusong<sup>5</sup>**

**la kastelo por la vent’  
sonas sen silent’  
hurle, muĝe kaj jelpe  
en fora  
la orient’  
misvagas zefiro  
sen onia atent’**

**ni por amuza prezent’  
kantadas kun sent’  
nur restas venta murmur’  
super la roka tegment’  
vanuas kantvoĉ’ jam  
en disblova torent’**

*1. Haoshijin (proksimiĝas bona afero): ĉina fiksfirma  
poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 56,65 / 75,65  
silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x = senrima)*

2. *Shanhuazi* (monta floro): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,7,73 / 77,73 silaboj, laŭ rimaranĝo *a,a,xa / xa,xa* (*x= senrima*)
3. *Yijianmei* (branĉo de umefloro): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun ses versoj de 7,44,744 silaboj, laŭ rimaranĝo *a,xa,xxa* (*x = senrima*)
4. *Jiangnanchun* (printempo sude de rivero): ĉina fikforma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj, laŭ rimaranĝo *xa,xa,xa* (*x=senrima*)
5. *Fengrusong* (vento inter pinoj): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ rimaranĝo *a,a,xxa,xa / a,a,xa,xa* (*x=senrima*)

